


Oficiala Organo de Kuba Esperanto-Asocio

## KEA: 20 jarojn je la servo de interkompreniĝo

- |  |       |
|--|-------|
| ☞ Ni daŭrigas estontecen<br><i>Juan Ramón Rodríguez</i>                  | 3     |
| ☞ Personoj libere<br><i>Juan Lazaro Brasada Toledo</i>                   | 5     |
| ☞ Omage al la 20-a datreveno: diskonigo ĉiurimeda<br><i>La Redaktoro</i> | 6     |
| ☞ Kampanjo 2000: finaj paŝoj<br><i>La Redaktoro</i>                      | 8     |
| ☞ Esperanto en la Kavali a Areo<br><i>Juan Ramón Rodríguez Gómez</i>     | 9     |
| ☞ Antaŭen Sancti Spiritus<br><i>Norberto Guevara</i>                     | 9     |
| ☞ Berlino en nia memoro<br><i>Maritza Gutiérrez González</i>             | 12-13 |
| ☞ La mevo de la rivero San Juan<br><i>La Redaktoro</i>                   | 14-15 |
| ☞ Elstaruloj de la lastaj 12 jaroj                                       | 16    |
- 

## Estimataj:

Kion aŭ kiun kulpigi pri la malfrua apero de ĉi numero de Avanco? Ĉu la presisto? Ĉu la laciĝo kutima dum ferioj (kiu ankoraŭ kredas, ke dum ferioj oni povas ripozi?) ne permesis labori? Ĉu eble la pluvo, kiu nuntempe falas kvazaŭ sitele? Ĉu...?

Ne, ne plu cerbumu. Okazas simple, ke nova redaktoro prenis la torĉon, kaj kiel preskaŭ ĉiam, novico devas batali kontraŭ nesperfeco kaj la leĝoj de Morphy.

Do bonvolu esti paciencaj...

Via nova redaktoro,  
Lic. Alberto García Fumero



## NACIA ESTRARO

\***Maritza Gutiérrez González**  
Prez.. Atentas plenumon de ĉiuj taskoj kaj fakoj.

\***Juan Ramón Rodríguez Gómez**  
Ĝenerala Sekr.. Kontrolas internan agadon./Historio, Ameriko, Avanco, La Noktuo kaj Universo

\***Martha Alonso Gutiérrez**  
Financoj./Resp.pri administraj aferoj

\***Alberto García Fumero**  
Informado./Hejmpaĝo

\***Pedro Fernández Rodríguez**  
Kulturo. Zorgas pri artaj k. klerigaj aranĝoj./Biblioteko

\***Héctor Jiménez Batista**  
Instruado k. ILEI-Sekcio.

\***Manuel Rodríguez Rábago**  
Internaciaj kaj Publikaj Rilatoj.

Komisiitoj

\***Roberto Torres Alvarez**  
Atento al alilandaj e-istoj.

\***Juan Lázaro Besada Toledo**  
Atento al verkistoj.

\***Carmen A. Hernández Socarrás**  
Faka Agado

XI-a jaro, nro.1 2/99, maj.-aŭg.) Aperas 3 foje jare (aprilo, aŭgusto kaj decembro) / Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 401364 kaj 404484 / Fakso: 53 7 33 8729 / Retadreso: kubesp@ip.etecsa.cu / Ĉefredaktoro: Alberto García Fumero / Kunlaboris: Juan Ramón Rodríguez Gómez / Revizio k. korektado: Maritza Gutiérrez / Komputila kaj grafika aranĝo: Roberto Molina Gálvez / Prezo: 1:00 CU 15 (enl.), 2,00 NLG aŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: keau-x-u / Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi 2 ekz. al la Redakcio).



# Ni daŭrigu estontecen



Vortoj de S-ro Juan Ramón Rodríguez, Ĝenerala Sekretario, datrevene de KEA.

Estimataj invititoj:

Estimataj samideanoj:

Ofte la ĉiutaga laboro ne permesas al ni rimarki kiom rapide la tempo pasas: jam iu diris iam ke dudek jaroj estas nenio. Do, la tempo, iom post iom, surprizas nin, jen ĝi kuras apud ni: simple, ŝajnas ke antaŭ kelaj semajnoj, ni festis la 18an (aŭ la 19an) datrevenon de nia kara Asocio. Tamen, la kuba esperantistaro, nia Esperanta familio, bone scias kion signifas 20 jarojn.

Por kelkaj personoj, datrevenoj estas tute sensignifaj. Kompreneble, la cikloj de diversaj homaj agadoj ne necese kongruas kun entjera kvanto da terondiroj; sed, tamen, la homoj mem emas al solenado de ĉiuj datrevenoj, kaj tiel tiuj pligraviĝas.

Pro tio, hodiaŭ ni festas la dudekjariĝon de Kuba E-Asocio. Oni dediĉis la tutan jaron al elstarigo de tiu ĉi institucio konekse kun siaj lingva, kultura kaj socia celoj. Do, ni prefere restu ĉi tie, ĉe gravega renkontiĝo, kiu iom brile pintas la festoserion.

Jen trafa momento por pripensi la trairitan vojon. Nia Asocio fariĝas dudekjara kaj fakte ni klopodas kiel eble plej dece omaĝi ĉi unikan okazajon. Nu, estas bona ŝanco por pensi, mediti kaj analizi kion oni faris, kion ankoraŭ farendas kaj, kial ne, por esprimi kelkajn konsiderojn.

Tion ni faros hodiaŭ, laŭte, kaj -kiel diris S-ro Julián Hernández, dum sia parolado en la centra aranĝo por la 19-a datreveno- «mi pensas ke tiel mi interpretos la sentojn kaj la pensojn de la esperantistoj kiuj estas ĉi tie, kaj ankaŭ de tiuj esperantistoj kiuj ne estas ĉi tie kaj multe laboras por la evoluo de Esperanto en nia lando».

Kiel sciante, antaŭ 1979 ekzistis nialande nur disa grupeto de esperantistoj, kiuj post multe da streboj sukcesis fondi la nunan Kuba Esperanto-Asociacion tiujare. Jen en miaj manoj la protokolon de tiu grava okazintaĵo, kie troveblas la nomojn de la ĉeestintoj en tiu ceremonio.

Bedaŭrinde, ne ĉiuj el ili estas ĉe ni: kelkaj forlasis aŭ nuntempe loĝas eksterlande kaj aliaj delonge ne aktivis en la Esperanto-movado, dum aliaj ankoraŭ intense laboras favore al la Internacia Lingvo en nia lando. Ni decidis inviti ĉiujn apartenantajn al la 2 lastaj grupoj por ke ili partoprenu nian hodiaŭan feston kaj kadre de ĝi lasi en siaj manoj kaj en siaj koroj nian rekonon. Al ili ĉiuj, ĉeestantoj aŭ neĉeestantoj en tiu ĉi grava aranĝo, koran dankon.

Kelkaj el ili, post la fondiĝo de KEA decidis ekfunkciigi klasoĉambron en la ĉefurba biblioteko Máximo Gómez, kaj la unuaj seriozaj malfacilaĵoj ekestis, kiam fininte la lernadon, la plimulto da gelemintoj forlasis la movadon, ĉar ne trovis allogon en ĝi. Tio instigis la lernejestrojn kaj KEA-estraranojn serĉi variantojn por reteni la finlemintojn. Tiucele ludis grava, sed tre fulmrapida rolo, la tiam juŝfondita E-Rondo de Centro-Havano, kiu plenumis diversajn Esperanto-aranĝojn en la lernejo mem.

Dum kelkaj jaroj, krom la lerneja agado, la movado ŝajnis fantomo posedanta nur kapon. Jam la 3-an de januaro 1983 oni malfermis la Centran Oficejon de la Asocio, kiu iom post

iom fariĝis renkontiĝejoj por aktivuloj, estraranoj, movadanoj... krom labori por Esperanto, ili ĉiuj praktikis la lingvon kaj ĝuis ĝin, sed la lerneja afero restis kema. Tiam, oni ekkomencis eksperimenti diversmaniere, estiĝis lernejoj en aliaj provincoj kaj nia instrusistemo pliboniĝis.

Aliaj malfacilaĵoj restis duonsolvitaj; ĉiesa tasko estis organiziĝo. Se kie ajn aniĝis, diskutis kaj protokolis esperantistoj, ne restu silenta kvazaŭ nenio estu okazanta: ni informiĝu kaj informu la ceterajn.

La disvastigo kaj sukcesigo de la Esperanta movado tra la lando en la sekvantaj jaroj estas konata de preskaŭ ni ĉiuj kaj ne precizas detali ĉion ĉi tie. Inter aliaj gravaj aferoj, menciendas la realigon de 3 naciaj kongresoj kaj 16 komitatkunsidoj, 7 naciaj seminarioj por instruistoj, 3 pri scienco kaj tekniko, kelkaj naciaj kaj regionaj renkontiĝoj, du naciaj kulturaj festivaloj, 11-jara Esperanto-programo pere de Radio Havano-Kubo, 5 gravaj internaciaj eventoj (75-a Universala Kongreso, 46-a IJK, 12-a Konferenco de ILEI kaj 2 teknikaj konferencoj), ktp.

Tiom da spertoj permesas al ni labori nuntempe por la konstanta plifortigo kaj sukcesigo de la poresperanta agado. En la lastaj jaroj, ni decidis ke, krom la jam kutima amaso da atingoj, prioritatiĝi ankaŭ la informadon ekde ĉiuj vidpunktoj al movadanoj kaj la internacia komunumo, esperantlingve; kaj al la ekstera publiko, hispanlingve. Jen kelkaj rezultoj de tiu decido: diversaj semajnaj programoj en provincaj radioelsendoj, 42 intervjuoj pere de naciaj radiostacioj dum 1998, duonhora televidprogramo dediĉita al KEA; kaj nur en la lastaj tagoj, pri tiu ĉi datreveno: reklamo pere de Radio Rebelde, intervjuo pere de Radio Havano-Kubo, Radio Progreso kaj Radio Rebelde; partopreno de 2 naciaj estraranoj en la nacia televido, kaj hodiaŭa informo en la ĵurnalo Granma.

Internaciskale, ankaŭ nia laboro sukcesas; kompreneble, ni havas multe pli da bonajn teknikajn rimedojn kiuj helpas nin fari pli bonajn internaciajn rilatojn kaj multe pli rapide komuniĝi kun la diversaj E-organizaĵoj kaj institucioj tra la tuta mondo: niaj rilatoj kun UEA, ILEI kaj aliaj organizoj estas tre bonaj; ni kontribuas al la evoluo de E-o en Ameriko, kaj rilatiĝas kun multaj landaj asocioj tra la mondo.

Do, nacie kaj internacie, nia bildo kreskas kaj antaŭvidas vigan vivon de Esperanto, ne nur ekde movada vidpunkto; sed kompreneble ankaŭ estontece ni multe devas agadi por ke nia laboro daŭrigu tiun atingitan ŝtupon, kaj ĉefe por ke nia esperantistaro, por ke ĉiu esperantisto unuope fariĝu vere aktiva esperantisto. Ni devas labori, ankaŭ, por ke ĉiu esperantisto konsciu ke E-o ne nur estas lingvo, sed ankaŭ kultura kaj socia fenomeno, kaj interna ideo, kiu ĉefa celo estas la progreso de la homaro, la paco kaj solidareco inter la diversaj homoj de la mondo, kaj tio ja estas vere trezora, grava kaj bela idealo, kaj ĉiu esperantisto devas konscii pri tio.

#### Karaj gesamideanoj:

La nuntempo postulas en kiu ajn laboro, homojn pli saĝajn, pli nteligentajn, pli fidindajn kaj pli kompetentajn. Ni agadu forte kaj respondece, por ke ĉiuj niaj aktivuloj, estraranoj kaj movadanoj atingu tiajn kvalitojn, kaj fakte nia Asocio kresku, progresu, marŝu, saltu, avancu... kaj atingu multe pli granda plenegecon.

Korajn dankojn!

## Pensoj Jubileaj

Dudek jarojn! Mirakle labirinta,  
laborprema, esperanta, feliĉiga,  
pasis mia vivo al nia lingv' liginta  
angorojn, revojn, amon. Jes, instiga

al batal' nobla, venke de l' mistero  
alportis la Asocio al la koro  
la vojon al ĝuado de l' ĥimero,  
la pasion kiu devenis fervoro.

Fervoro Zamenhofa kaj homama  
revanta pri plej frata harmonio,  
kiel trumpetoplena voĉ' proklama  
dolĉa al la kor', tre paca melodio.

Sentoj galopas tra mia animo nuna  
ekstazo pro la bono de la beno,  
ĉar nin vipis neniu penso puna  
dum la vojaĝo al ĉi tiu bela ebena.

Junio, al kor' monato la plej kara  
por ĉiam nin markis Via tago deksesa  
dediĉo al celo hela estis ne erara,  
mirakla sparko de lumo senĉesa.

La voĉ' ordona pelis nin al vojo  
de konsekriĝo la plej energia  
al Esperanto, kiu estas la roĵo  
de nia viv', ocean' plej emocia.

Asocio kiu nin gvidas kaj postulas  
de nia sango, guton eĉ la lastan,  
en niaj vejnoj la estonteco brulas  
naskanta horizonton vere vastan.

Komuna hejmo, ĝi estas ĉies tranĉeo,  
kiun ni devas elfosi per laboro  
por nia vivo ĝi estas panaceo,  
lapidara, eterna kortrezoro.

Ĝi fariĝu dum la nokto lanterno  
lumiganta nian vojon kaj predikon,  
estu por ni ties historio, korkerno  
sterku ni la fekundan radikon.

La kanto de mia liro elfluu vasta  
tra l' glob' de l' ter' portante mesaĝon  
nia agado neniam estos balasta,  
havas ni inteligenton kaj kuraĝon.

Grefti KEA-n en la mond' estas nia devo  
al tio nian laboradon ni fordonu  
tiel realiĝos tiu nia revo  
al ĉiu aŭdanta homo ni proponu

la solvon ple racian de problemo  
frapanta hodiaŭ la tutan homaron,  
la lingva diverseco ne estas lerno  
solvu ni la senkomunikon baron!

Per volo kaj instrumento matura  
per lingvo neŭtrala kaj sendanĝera  
ĉar nur pere de tiu flugo aventura  
estiĝos interkompreniĝ' tuttera.

Pensoj flugu al mortintaj niaj fratoj  
kiuj ne atingis ĉi tiun jubileon  
de la emocio vibru ĉiuj kordratoj  
rompante de la larmoj la moleon.

Jes! Jubileo de esperantistaro  
kiu preter malfacilaĵoj la nunaj  
traboris ilin per marŝanta ĉaro,  
ni ja obstinas kiel mesaĝoj runaj.

Antaŭen! Ni ne hezitu, la flago  
de nia lingvo flirtu tra la ter'  
ĉiu nia strebo konkretiĝu en ago  
ĉar nin subtenas nevenkebla ver'.

Vivas, ekzistas lingvo internacia  
de ĝi ni estas fidelaj servantoj  
niaj oferoj por la evoluo asocia  
estas la plej idealaj ĝojkantoj.

KEA nin invitas, KEA nin ĉiujn vokas,  
servante ĝin, ni eliras el la kelo  
ne gravas se la mondo nin provokas  
kun decido ni iru al nia celo.

Ankaŭ pionirojn stultuloj mokis  
tamen stultulojn memoras neniu,  
nin malkleruloj per vortoj ne ŝokis  
do kristalvibra nia voĉo krii.

Kreskadu Kuba Esperanto-Asocio  
tiu, nia amatino dudekjara  
ĝin vartu ĉiam nia fantazio  
per amo kaj laboro solidara.

# Omaĝe al la 20-a datreveno: diskonigo ĉiurimeda radie

La 3-an de junio samideano Mario Ruiz informis pri Esperanto ĝenerale kaj pri la tiam baldaŭ okazonta 20-a datreveno de KEA dum elsendo de la programo Juventud 2000 (Junularo 2000) de la nacia radiostacio Radio Rebelde... kelkaj tagoj antaŭ la datreveno, frapfrazo pri Kuba Esperanto-Asocio estis disaŭdigita regule de radiostacio naciskala. La necesajn demarŝojn faris la senlaca aktivulo Alejandro García...

## ekspozicie...

Dumkongrese (de la 11-a ĝis la 13-a de marto) la ekspozicio **Esperanto: Lingvo, Kulturo, Movado** estis prezentita en la Nacia Biblioteko. Plia ekspozicio pri Esperanto (libroj, revuoj, ktp.) estis prezentita de la 3-an ĝis la 9-a de majo, 1999, en la «Domo de la Pedagogoj», Municipo Playa, en la ĉefurbo, dank' al la laboro de senlacaj aktivuloj. Poste ĝi transiris al la Municipo Arroyo Naranjo. Plia ekspozicio estis muntita en apoteko de la municipo Marianao.

De la 28 de julio ĝis la 11-an de aŭgusto, ekspozicio pri Esperanto estis en la Unua Reformita Presbitera Eklezio, en strato Salud inter stratoj Lealtad kaj Campanario, danke al la laboro de nia aktivulo Amado Guerra, kaj al la Pastro Héctor Méndez, kiu tre favore reagis.

## televide...

La 15-an de junio, 1999 samideanoj Juan Ramón Rodríguez, Ĝenerala sekretario de KEA kaj Alberto García Fumero, Sekretario pri Informado, estis intervjuitaj dum elsendo de la populara, naciskala televidprogramo "Tveré". La televidelsendo mem komenciĝis per vidbendaĵo - esperantlingva kantado de la populara kuba kantisto Vicente Feliú - kiu estis taŭga enkonduko al la afero.

Samideanoj Rodríguez kaj García parolis pri la loko de Esperanto ene de la nuna mondo, la laboro farita de KEA dum ĝia ekzisto, kiel lerni E-on en Kubo kaj planoj por la estonteco. Kanto kaj intervjuo daŭris entute 6 minutoj.

## kaj ĵurnale...

La 1-an de majo aperis la artikolo "Esperantistoj en Sankta Clara" en la ĵurnalo "Vanguardia" de tiu ĉi provinco, pri la regiona renkontiĝo kaj pri la 20-a datreveno de KEA. La 16-an de junio la ĉefa ĵurnalo kuba "Granma" aperigis artikolon de la Ĝenerala Sekretario pri la laboro de KEA dum ĉi tiuj 20 jaroj.

Tiutage la artikolo estis ripetita ĉiun duonan horon de la naciskala radiostacio "Radio Reloj" (Radiostacio Horloĝo), kiu kutime tiamaniere ripetas la plej gravajn novaĵojn aperintajn en "Granma".



### **Novaj kubaj fakdelegitoj**

En la lasta eldono de la jarlibro aperas novaj fakdelegitoj kubaj:

JD kaj FD (terapio:Yumeiho): S-ro Fráncel Briel Gil, elektronika teknikisto. Edificio 58 apto. 203, 11700 Habana del Este, Kubo. Telefonnumero:972659

FD (terapio:Yumeiho): S-ro Francisco Briel de Cañas, industria inĝeniero. Edificio 58 apto. 203, 11700 Habana del Este, Kubo. Telefonnumero:972659

FD (radiojurnalismo): S-ino Maritza Gutiérrez González, ĵurnalistino. Str. Avellaneda 212, e/ Gertrudis y Josefina, 10500 La Habana. Telefonnumero: 401364, Fakso: 338729

### ***Kuba Peranto***

S-ro Lázaro Azcuy (estranano ĉefurba) estas peranto en Kubo de Komencanto, Internacia Gazeto por komencantaj gazeto por komencantaj esperantistoj kaj aŭtoroj. Provekzemplero kontraŭ 1 IRK.

### **Lingva konsultejo**

Sub la gvido de la ĵurnalistoj Stefan Maul oni lanĉis retan konsultejon por e-istoj: la Konsultejo de la Akademio de Esperanto, ĉe [maul@newsfactory.net](mailto:maul@newsfactory.net).

Tiamaniere esp-istoj povos peti konsilon kaj klarigojn kaze de duboj rilate al la uzado de nia lingvo.


Tiuj, kiuj ne ĝuas aliron al Interreto, povos tamen sendi ordinaran leteron al: Pferseer Str.15 - DE-86150, Augsburg, Germanio.

### **Atentu matematikistoj!**

E-istoj Matematikistoj povas kontakti la Internacian Asocion de Esperantistoj Matematikistoj per la retadreso: [heulingenbruner@aon.at](mailto:heulingenbruner@aon.at), aŭ per ordinara poŝto ĉe: Vorderdimbach 11 -A-4371 Dimbach, Aŭstrio.

### ***Radioprogramoj***

Estas 5-minuta, ĉiujajnda sekcio pri Esperanto en la programo «Cuarta Dimensión» («Kvara Dimensio») ĉe la provinca radiostacio Radio Sancti Spíritus. La dissendon prizorgas S-ino Yoandra Rodríguez kaj S-ro Norberto Guevara, respektive prezidantino kaj Ĝenerala Sekretario de la Provinca Filio de Kuba Esperanto-Asocio. Ankaŭ la estraro de la provinco Camagüey informas pri 5-minuta kurseto ĉiumerkreda (posttagmeze) ĉe la loka radiostacio Radio Cadena Agramonte.



**Ni ankoraŭ atendas Viajn kontribuojn...**

**Kie ili estas?**

## ***Kampanjo 2000: firmaj paŝoj***

***Kunlaboro kun ACNU***



Kadre de kunlaboro kun neesperantistaj asocioj, la Ĝenerala Sekretario de Kuba Esperanto-Asocio, S-ro Juan Ramón Rodríguez, partoprenis dum tri tagoj (de la 14-a ĝis 16-a de aprilo, 1999) internacian seminarion kun ĉeftemo: «La elmigraj fluoj kaj la konsula agado fronte al la XXI-a jarcento» kunordigitan de Kuba Asocio de Unuiĝintaj Nacioj (ACNU). La seminarion, okazinta en la Centro je Internacia Informado, malfermis la kuba vicministro pri eksteraj rilatoj, Jorge Bolaños. Postan aranĝon, tiukaze prelego de D-ro Giovanni Camilleri, kunordiganto de la Programo je Homa Disvolvo en Kubo kaj same organizitan de ACNU, ĉeestis la Sekretario pri Informado.

Rilatoj inter la du asocioj estas bonaj, kaj Kuba Asocio de Unuiĝintaj Nacioj esprimis intereson okazigi kunan klerigarĝon omaĝe al la 20-a datreveno de Kuba Esperanto-Asocio, la 8-an de septembro, 1999 en la sidejo de ACNU. Temos pri la Simpozio «La Sistemo de Unuiĝintaj Nacioj kaj Esperanto». La programo inkluzivas prelegon fare de la Ĝenerala Sekretario de KEA, ŝtampadon kaj ekspozicion je filatelaĵoj, koktelon kaj kulturen programeton, kie kantos en la internacia la konata kuba kantistino Beatriz Márquez. La Simpozion partoprenos ankaŭ la reprezentanto de Unuiĝintaj Nacioj en Kubo.

## ***Kunlaboro kun Kuba Komisiono pri UNESKO***

Kiel parton de projekto pri disvastigo de Esperanto tra la Kariba areo prezentita de KEA al la Nacia Komisiono pri UNESKO, la ĝenerala sekretario de Kuba Esperanto-Asocio ricevis inviton por partopreni la teoriajn diskutojn dum la Festivalo de la Karibo, kiu okazis de la 3-a ĝis la 9-a de julio, 1999. Ĝenerala temo de la Festivalo: «La Karibo kiu unuigas nin».



# Esperanto en la Kariba Areo

## Propono Prezenta de KEA al la Komisiono Kuba pri UNESKO

- *Konscia pri tio, ke la nivelo je disvolvo atingita de la moderna mondo postulas, ĉiam pli konstantan kaj kreskantan internacian interŝanĝon;*
- *Konvinkita, ke tia disvolvo akcele antaŭeniras al globiga procezo je neantaŭvideblaj rezultoj;*
- *Informita pri la procezoj je regiona integriĝo (Eŭropa Unuiĝo, Asocio je Karibaj Ŝtatoj...), kiuj instigas ĉiufankan alproksimiĝon;*
- *Prenante en konsideron la barilon por la plena integriĝo, kiun konsistigas la lingvodiverseco, ne nur je ŝtata aŭ registara niveloj, sed ankaŭ por unuopulaj kontaktoj;*

*Kuba Esperanto-Asocio*

*Proponas:*

*Favorigi, instigi kaj disvolvi la uzadon de esperanto en la Kariba areo, prenante kiel starpunktojn:*

*La nuna Integriĝa procezo en la regiono*

*La lingva diverseco en ĝi ekzistanta (lingvoj hispana, angla, franca, kreola, nederlanda...)*

*La stabilecon atingita de Esperanto dum pli ol jarcento je praktika uzado, kaj*

*La tri UNESKO-rezolucioj favore al la Internacia Lingvo.*

*Konkretaj ideoj cele al la atingo de tiu kultura interŝanĝo:*

1. *Esplori kun kulturaj institucioj karibaj la disvastigon de informoj pri Esperanto.*
2. *Esplori kun tiuj institucioj la instruadon de esperanto per instruistoj el nia Asocio.*
3. *Demarŝi la eventualan reeldonadon de Kariba Stelo, eldoniĝo asocia dum la 80-aj jaroj. Ĝi povus aperi en pli ol unu lingvo (hispana, angla, kreola, nederlanda... kaj esperanto, laŭaŭspicie.*
4. *Same agadi rilate al Latinamerika Esperantisto, eldonita en Kubo dum la jaroj 1912-1917.*
5. *Instigi la interŝanĝon je esperantistoj el diversaj landoj kaj esplori ilian partoprenon en la Festivalo je Karibaj Artoj, ĉiujare okazanta en Kubo.*

*Ni kalkulas kun apogo kaj helpo de la jenaj esperantaj institucioj:*

- *Subteno flanke de la Komisiono Ameriko de Universala Esperanto-Asocio.*
- *Subteno flanke de la asocioj en landoj el norda, centra kaj suda Amerikoj.*
- *Subteno flanke de esperantaj institucioj el aliaj regionoj.*



## **Seminario Nacia por Instruistoj: unu plia!**

Sukcese kiel ĉiam, oni okazigis en la nacia sidejo de KEA la 8-an (unu plian, jes!) Nacian Seminarion por Instruistoj, de la 1-an ĝis la 3-an de julio, 1999 kun entute 10 homoj. Post bonveniga koktelo la afero komenciĝis la 2-an, per sesioj, spektado de vidbendaĵo, prezentado de praktikaj instrulekcionoj flanke de la partoprenantoj el la diversaj provincaj kaj municipaj filioj, analizo kaj debato de la prezentotaj temoj, ktp. Dum la vendredaj sesioj oni prezentis la lastan numeron de "Saĝa Sago" kaj analizis gramatikajn aspektojn de la lingvo. Alia ero de la programo estis prezentado de temoj pri metodologio de la instruado de Esperanto.



## **Antaŭen, Sancti Spiritus!**

La provinca filio en Sancti Spiritus engaĝiĝis en informokampanjon celanta diskonigi la historion kaj trajtojn de komunumo ja forta en la nuna monda socio, alproksimigi la esperanto-aferojn al la urba kultura etoso, ĉar la movado portas valorajn kulturajn, kiuj sendube pliriĉigos la lokan kulturan vivon, kaj diskonigi la laboragadon, okazintaĵojn kaj aktualajn informojn de la asocio kaj la movado, kio sendube kontribuos al la bildigo de esperanto kiel familia afero ĉe la socio kaj ne kiel strangajo. La strategio estas ja sekvo de la stimula efiko de "Kampanjo 2000", sperte kaj saĝe proponita de la nun UEA-eksprezidanto Lee Chong-Yeong.

Kiel unua paŝo, kaj post daŭraj demarŝoj, la 22-an de aprilo 1999, komenciĝis perioda Esperanto-sekcio kadre de la ŝtata kaj vaste aŭskultata kultura radioprogramo "Kvara Dimensio", ĉe la loka radiostacio "Radio Sancti Spiritus". La temo de la unua elsendo enkondukis sciindaĵojn pri Zamenhof, la lingvo kaj la posta evoluo de la movado.

La temoj estas variaj, kaj konstanta strebo estas fari ilin interesaj kaj allogaj. Je la fino de la elsendo (kiu okazas ĉiujara inter la 3-a kaj la 4-a postagmeze) fariĝis kutimo diskonigi aktualajn informojn kiu ofte estas ne nur tute esperantaj, sed kun sugesta rilato al la monda socio. Ekzemple menciindas la rekta rilato de Julio Verne al Esperanto, la alprenado de E-propagando fare de Michael Jackson, la prestiĝaj Nobel-premiitoj kun inda esperantumado,

la esperantisteco de la famekonataj hungaraj ŝakistinoj Polgar.

Serioza zorgo, kiu konsilendas al E-filioj farantaj kaj farontaj similan laboron, estas baziĝi sur fidindaj informfontoj, kaj sen fervoraj froigoj simple informi la veron, kio nepre levos la prestiĝon de Esperanto kaj ties movado.

La reago al la sekcio estis tre favora kaj pluraj aŭskultantoj sendis korespondataĵojn kaj/aŭ rekte telefonis. Kulmino de la plifirmigo de la sekcio estis la ricevo de surbildaĵoj kaj gratulaj vortoj kun la subskribo de la UEA-vicprezidanto Renato Corsetti. Aldonindas retmesaĝoj el Internacia Esperanto-Instituto en Hago kaj el Pola Radio, kies redaktoro Andrzej Pełtyn petis precizajn informojn pri la radioagado por diskonigo pere de la polaj E-programoj.

Tia etoso de streĉa komunikado estas trajto unika de la Esperanto-komunumo, kies anoj sindone apogas kaj reagas al poresperantaj streboj. Tio vere plifirmigas Esperanton kaj pravas, ke la komuna laboro por komuna celo estas baza principo por ĉia venko.

Celo de "Kampanjo 2000" estas "levi la organizan kaj idean nivelon de la movado" kaj la loka filio laboris/laboras en rilato kun tio. Tiel, kiel dua paŝo, estis nepre bezono solvi la problemon rilata al la manko da sidejo. Post pluraj rendezuoj kun lokaj funkciuloj, la estraro de la Municipa Kulturdomo proponis al ni okupi malgrandan, sed freŝan kaj vere allogan oficejon sur la teraso de la konstruaĵo. Post la necesaj riparoj la esperantistoj tuj translokigis al la nova sidejo la dokumentaron kaj la materialojn, kiujn estos tre baldaŭ orgaizotaj tie.

La kondiĉoj kreitaj premesas al ni alpaŝi gravan taskoŝtupon: kreskigo de la movado kvante kaj kvalite. Tiucele ni malfermos novajn trimonatajn kursojn (ekspresajn) kiuj en antaŭaj okazoj estis tre avantaĝaj kaj fruktodonaj.

Laboro abundas, sed certe ĝi fariĝos facila pro la entuziasmo de la estraro. Alte staras la sidejo de la Provinca Filio kaj same alte troviĝas la deziro antaŭenpuŝi Esperanton en la teritorio.

**Norberto Guevara, Ĝenerala Sekretario**  
**Provinca Filio Sancti Spiritus**




***Neniu pli blinda ol tiu...***

**Kiu ne deziras vidi Esperanton!**

## Berlino en nia memoro

Konatiĝi kun Berlino estis en si mem valorega sperto kiun oni gardas por ĉiam en la memoro kiel emociplena kaj historia momento en nia vivo. Alvenante en la urbo de grandaj homaj okazaĵoj ĉi jarcentaj oni sentas ĝian influon je grandeco kaj ankaŭ ĝian enorman pezon kiu ŝajnigas ion ajn malgranda kaj kvazaŭ senvalora kompare kun ĝiaj imponaj konstruaĵoj kaj historiaj spuroj de militoj, malpacoj, reconstruo, maltoleremo, kulturo. Ĉio ĉi kunfandiĝas kaj faras el ĝi interesan urbon kie ĉi foje renkontiĝis ĉirkaŭ 2572 esperantistoj el 62 landoj por okazigi la 84an Universalan Kongreson de Esperanto sub la temo Tutmondiĝo: ĉu ŝancoj por paco? La kongreso sesiis inter la 31a de julio kaj la 7a de aŭgusto en la Internacia Kongresa Centro de Berlino kiu rezultigis tre imponan kaj eĉ tro grandan kongresejon sed ja komfortan kaj taŭgan por la diversaj programeroj.

Inter la plej elstaraj programeroj Kongresa Universitato sub kiu arigis prelegantojn kiajn Boulton, Maria Rafaela Uruena Australio kaj aliaj, kiuj prelegis homaranismo kaj matematiko estis prezentataj dum la dumkongresaj. Ne malpli grava Simpozio pri Tutmondiĝo kaj lingva nekongresa aranĝo tamen dumkongresa kaj estis la 52a sesio de la Internacia rektorado de Reinhard Selten, Humphrey Tonkin, Marjorie el Hispanio, Alan J. Bishop el pri literaturo, poetiko, respektive. Entute ok prelegoj universitataj sesioj kaj interesa estis la dua Nitobe diverseco, kiun oni konsideras speciale por invititoj ne esperantistoj, politikistoj kaj aliaj. La debatoj okazis en Esperanto, la angla kaj foje la germana lingvo kun samtempa interpretado. Oni taksis ĝin valora kaj pensiga tiel ke kontribuas al esprimado de diversaj opinioj kaj skizo de interesaj ideoj pri la lingva problemo. Pluraj fakaj kunsidoj okazis, nome la radioamantoj, virinoj, bahaanoj, medicinistoj, k. a. La komitataj sesioj estis longaj kaj oni decidis pri aliĝo de du landaj asocioj, nome Kostariko kaj Kartvelio. Oni decidis pri la kongresurbo de la jaro 2002, kiu feliĉe estos Fortaleza en Brazilo, kion ni tre ĝoje bonvenigis pro tio ke jam longe nia kontinento atendis tian decidon sendube gravegan por solidiĝo de la brazila movado kaj ankaŭ por plifortigo de la Amerika movado. Fakte de nia regiono kiel kutime malmultaj esperantistoj povis partopreni la berlinan kongreson pro la konataj financaj baroj ekzistantaj por pli reala reprezento de nia kontinento en tiaj eventoj, tamen, okazis kiel planite la publika kunsido de Ameriko en plenplena salono gvidite de Atilio Orellanas, komisiito de UEA por la regiono. Tie oni parolis pri la kontinenta laboro, estis prezentata la gazeto AktivAmeriko en ĝia papera versio, rezulto de plurjara strebo kiu finfine iĝis realo danke al laboro aparta de James Rezende Piton en kunlaboro kun diversaj komisionanoj kaj landaj asocioj kiuj dissendas informojn al li. Du landoj faris publikan raporton, nome Brazilo kaj Kubo kaj estis aŭskultata raporto de Bill Maxey, elstara aktivulo en la regiono. Pri aliaj kongresaj momentoj indas menciigi la teatrajn prezentojn de la drama grupo de Studenta E-klubo el Zagrebo kaj la teatra trupo Lutkobus kun la spektaklo de La Eta Princo, kiu kaptis la atenton de la publiko per unika etoso kaj lingva regalo.



Multaj aliaj momentoj indas je mencio. la koncertoj de Jomart kaj Nataša ĉe salono Delforgue, la simplaj babiladoj en la supra kaj malsupra vestibloj de la kongresejo, la rendevua tabulo, la aŭkcio gvidite de H. Tonkin, kiu kolektis monon por la volontula fondaĵo, la premioj de la belarta konkurso de UEA, la gazetara servo kiu aparte bone funkciis por ĵurnalismaj laboroj eĉ sen bona fermita ĉambro por intervjuo, tamen tre bona pro la servo de ĝiaj laborantoj kiuj ĉiam klopodis por pli bona laboro kaj diskonigo de informoj kaj multaj aliaj eroj pri kiuj ne eblas pli detale paroli pro spaca manko. Resume, la semajno forflugis mirinde rapide. La kuba delegacio, plej parte unuafaj kongresanoj klopodis partopreni en diversaj eroj, nome en la seminarioj, konversaciaj rondoj, fakaj kunsidoj, prelegoj kaj aliaj. Ni aparte renkontis amikojn de Kubo kaj interesatojn pri la ĵarfina renkontiĝo en Havano, al kiuj ni transdonis informojn pri ties preparlaboroj kaj speciale al membroj de IKEK kiuj scivolemas pri Kubo kaj prepariĝas por sia jara kunveno en nia ĉefurbo. Do, la 84a Uko en Berlino estis bela, impona kaj unika memorajo kiun ni gardos kiel neforgesinda kaj profitdona sperto certe stimulantanta nin al plia laboro kaj perfektigo. Ni dankas al ĉiuj kiuj iel aliel kontribuis al nia sukcesa partopreno en la berlina kongreso kaj per sia sindonemo kaj bonkoro plibeligis nian senton kaj certecon ke Esperantismo estas ja realo.

*Maritza Gutiérrez*



Kubanoj en Berlino: Maritza Gutiérrez, Julio César Tamayo kaj Pedro Fernández

## La mevo de la rivero San Juan

Printempe de la jaro 1795. En Matanzas, urbo je pli ol ses mil loĝantoj, loĝis en domaĉo el ligno kaj palmofolioj olda sklavino, "Ma" Teresa, kun nepino, onidire filino de la olda fraŭlo Don Sebastián, la ĉiopova mastro de Ma Teresa. Ma Teresa, kvankam sklavino, vivis kvazaŭ libere, eĉ ricevante pension de Don Sebastián.

La nepino ricevis la nomon Julia Rosa; tion volis la mastro.


Cinamkolora silko estis ŝia haŭto; ŝian belan vizaĝon perfektigis du verdajn okulojn kiuj elradiis al la mondo ŝian deksepjaran gajecon.

Feliĉigis la maliculojn, ke ankaŭ don Sebastián havis verdajn okulojn, kiuj fulmis kiam malprudentulo kuraĝis aludi en lia ĉeesto al la dometo ĉe la rivero. Tion bone sciis lia pli aĝa fratino Doña Rosario, kiu per malfavoraj okuloj vidis tion, ke la olda Ma Teresa (sklavino!) loĝas ekster la familia domo de la strato Ríca (hodiaŭa strato Independencia), kiun ŝi dommastris, kvankam la frato kelkfoje kaj kvazaŭ pasante, memorigis, ke nur li estas mastro. Kio veras estas (kaj tion Doña Rosario perfekte komprenis), ke la loĝado de Ma Teresa kun la nepino ekster la domo nutris la skandalon okazinta kiam Julia, filino de Ma Teresa, naskis antaŭ ol morti preskaŭ blankan bebinon, afero ankoraŭ pli skandala pro tio, ke la mastro publike priploris la morton.

Krome, al Doña Rosario multe ĝenis Julia Rosa, kiu povas ricevi parton de la heredo; heredo kiun ŝi ambiciis por sia filo Felipe. Krome, Doña Rosario revis vidi la filon edzigita al iu Elvirita, el bonega familio...jam Felipe aĝis 25 jarojn, oni devas ja zorgi pri tiaj aferoj...

\*\*\*\*\*

La novaĵo trafis du parojn da oreloj: Don Sebastián ĝin rivevis dum posttagmeza promenado kun lia olda amiko Don Pablo García; Doña Rosario ricevis ĝin post la meso, el la lipoj de Doña María Elvira, patrino de Elvirita...



Terura novaĵo! Felipe jam de antaŭ du semajnoj vizitis ĉiutage la dometon de Ma Teresa...

Doña Rosario, profitante foreston kaj de frato kaj de filo, alvokis al Tata Mongo, sia olda kaj fidela sklavo. Li certigis, ke li povas solvi la problemon rilate al Niño Felipe kaj Julia Rosa, ĉar li posedis multajn sekretojn de la tempo, kiam en la fora Afriko oni elektis lin estron de sorĉistoj... Tie li paroladis kun ĉiopovaj dioj, kiuj ankoraŭ lin favoras...

La suno jam ne estis rigardanta la teron, kiam Tata Mongo alvenis al la dometo ĉe la rivero portanta misteran frandaĵon el kokosa pulpo por Julia Rosa. La olda Ma Teresa, helpanta en akuŝo, forestis.

Julia Rosa primanĝis la frandaĵon. Ĝi bongustis. Dume, Tata Mongo rakontis strangajn historiojn. Li diris, ke en Afriko la grandaj sorĉistoj povas peti al la dioj turni virinon en senmortan birdon. La juna mulatino, scivolema, demandis, ĉu Tata Mongo kapablas tion fari. Jese li respondis, kaj aldonis, ke li kapablas turni sin en mevon, en senmortan mevon. Julia Rosa multe ridis...

\*\*\*\*\*

Don Sebastián preskaŭ freneziĝis; Julia Rosa estas malaperinta. Ma. Teresa ploradis dum la tuta tago. Felipe, senespera, demandis al ĉiuj pri ŝi.

Tata Mongo estis diskrete sendita de Doña Rosario al fora bieno. Ŝi komencis senti la venenan mordan de konscienciproĉoj.

Iun nokton, post la manĝo, Ma Teresa frapis la pardonon. El ŝiaj lipoj ĉiuj auskultis, ke ŝi scias pri la fato de ŝia nepino. Ma Teresa asertis, ke Julia Rosa estas turnita de la afrikaj dioj en mevon.

Ĉiuj pensis, ke ŝi frenezas...

\*\*\*\*\*

Felipe sidas antaŭ la dometo ĉe la rivero. Lia koro estas neplorable larmo. Subite li vidas alproksimiĝi mevon, kiu lin rigardas kvazaŭ home.

La mevo estas verdokula....

Oni diras, ke la freneziĝinta Felipe mortis amanta mevon. Kaj verdokula mevo ofte svebas super la urbo kaj la rivero. Temas pri mistera, ŝajne senmorta mevo...

Eltirita el "Legendoj Kubaj " de la kuba verkisto Salvador Bueno.

Traduko kaj adapto de Alberto García Fumero.

## *Jen la plej elstaraj esperantistoj naciskale dum la lastaj 12 monatoj:*

### Guantánamo

- Roberto Cutiño
- Raúl Sánchez
- Leonardo Luna
- Gernima Francis
- Tirso Enrique Avila

### Santiago de Cuba

- Julio César Tamayo
- Gonzalo Collantes
- Miozotis Planas
- José Saavedra
- María Luz Moya
- Vicente Rodríguez

- Pedro Enrique Peña
- Joaquín Sánchez
- Leonardo Téllez
- Graciela Morgado

### Granma

- Rafael Cabrera
- Dubel Lachatañeris
- Sebastián Duque de Estrada
- Daniel Caraballo

### Holguín

- Isnel Pupo

### Las Tunas

- Reinaldo Fontaine
- Osmundo Marrero
- Luis Manuel Arenas

### Camagüey

- Jorge Luis Santillán
- Edilberto Rodríguez

### Sancti Spiritus

- Yoandra Rodríguez
- Norberto Díaz

### Villa Clara

- José Luis Montes de Oca

### Cienfuegos

- Luis Manuel Vergel

### Matanzas

- José de Jesús Campos
- Raúl Rodríguez
- Clara Elsa Torriente

### Urbo Havano

- Julián Hernández
- Maritza Gutiérrez
- Juan Ramón Rodríguez
- Marta Alonso
- Alberto García
- Manuel Rodríguez
- Pedro Fernández
- Héctor Jiménez
- Juan Lázaro Besada
- Roberto Torres
- Cirilo Ramos
- Alberto Gabriel Rodríguez
- Felicia Rose
- Georgina Almanza
- Lázaro Azcuy
- Mario Ruiz
- Giezi Rodríguez
- Roberto Molina
- Albania Duthil
- Alejandro Rodríguez
- Fernando Paredes
- Carlos Caésar
- Elías Fernández
- Jesús Martínez
- Eutimio Cause

**GRATULOJN!**